

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- En la unua numero de la gazeto *Esperanto*, kiun li verkis, Hector Hodler difinis sian sintenon rilate al la lingvo internacia. Li skribis :

Cl.- « *Esperanto, kiu estis teorie bona kaj taŭga, fariĝis, per la literatura praktikado, vere vivanta lingvo ekzistanta per si mem ekster la aliaj lingvoj.* »

A.- En la sama front-artikolo li ankoraŭ diris :

Cl.- « *Ni konsideras ĉian disputon pri ia jam ekzistanta afero en la lingvo kiel superflua kaj malutila ; nia lingvo vivas kiel idiomato ajn, sekve ĝi ne estas perforte tuŝebla.* »

A.- Tion li skribis en februaro 1907. Verŝajne li antaŭsentis, ke en la franca esperantistaro latentis tendenco al reformo de esperanto. Ni memoru, ke en oktobro de la sama jaro, el la kunsidoj de la **Delegacio por alpreno de la lingvo internacia** naskiĝos **Ido**, kiu estas esperanto reformita. Ni ankaŭ memoru, ke Louis de Beaufront estos unu el la patroj de tiu lingvo-projekto.

Cl.- Tiuj reformemuloj ne komprenis, ke, kiel diras Hector Hodler, « *Esperanto fariĝis vivanta lingvo ekzistanta per si mem ekster la aliaj lingvoj.* » Eble eĉ Louis de Beaufront ne povis akcepti tiun evoluon, ĉar li perdis la gvidpovon super la esperanto-movado.

A.- Plurfoje en la gazeto *Esperanto* Hector Hodler atentigas la legantojn kontraŭ la iluzio de la reformismo. Li ankaŭ timas la efemerajn entuziasmojn. En la tria numero de la gazeto *Esperanto* li skribas :

Cl.- « *Ni [...] pli kaj pli internacie uzu Esperanton ; al tio ĉi ni dediĉu niajn klopodojn, nian atenton. Tiam, kaj nur tiam, Esperanto estos io forta, vere vivanta kaj neŝancelebla, ĉar ĝi havos sian radikon en la bezono mem de siaj uzantoj, kaj ne nur en ilia entuziasmo kaj fervoro, kiuj estas ecoj forflugemaj kaj tro rapide mortemaj.* »

A.- En aprilo li skribas en **Kroniko Esperantista**, kiu recenzas la novajn librojn :

Cl.- « *Ĉiuj lingvistaj esperantistoj pasigis multe da tempo por solvi la demandojn pri **igi** kaj **aĵo** : ĉu **igi** signifas **igi-anta** aŭ **igi-ata** ; ĉu **aĵo** implikas pasivan aŭ aktivan sencon ? Por tio, defluis multe da inko el la plumoj de gramatikistoj aŭ regolistoj de Esperanto. D-ro Zamenhof, en **La Revuo**, respondas tiujn diversajn punktojn. **Igi** per si mem signifas nek **igi-anta**, nek **igi-ata**, sed nur **igi-i**; sekve ĝi povas esti uzita en sencoj aktiva aŭ pasiva ; nur se estas ia dubo, oni povas tre bone aldoni **igi** post la participo.* »

A.- Hector Hodler donas ekzemplon kaj montras, ke same estas por **aĵo**. Tiu sufikso havas sencon nek pure aktivan, nek pure pasivan. Kaj li konkludas :

Cl.- « *Jen estas punktoj klarigitaj ; tio ĉi montras aŭ remontras al ni, ke oni tute ne devas plimulti la regulojn kaj sin enkatenigi per tro severaj leĝoj, sed kontraŭe konservi en la stilo liberecon en tiu ĉi grado, kiam ĝi kontraŭiĝas nek al logiko, nek al la klareco – la supra leĝo.* »

A.- Sed tra la esperantistaro daŭre aŭdiĝis bruoj pri reformoj de esperanto. Pro tio en sia maja **Kroniko Esperantista** Hector Hodler precizigas sian sintenon rilate al la reformismo. Li apogas d-ron Zamenhof, citante erojn el lia protesto en *La Revuo*. Li skribas :

Cl.- « En la lasta tempo, diras D-ro Zamenhof, inter la Esperantistoj kuris la famo, ke mi intencas reformi Esperanton. Tiu ĉi famo, kiu povas fariĝi tre danĝera, estas absolute malvera. Mi neniam intencis arbitre reformi la lingvon, ĉar tio ĉi ne sole estus pereiga por nia afero, sed mi havas por tio ĉi nenian moralan rajton. » D-ro Zamenhof klarigas poste, ke Esperanto nun apartenas al la tuta mondo esperantista kaj ke li ne povas fari en ĝi eĉ plej malgrandan ŝanĝon precipe nun, post la Deklaracio, kiun li propravole donis en la Bulonja kongreso. »

A.- Post kelkaj pliaj klarigoj Hector Hodler konkludas :

Cl.- « Estus tre dezirinde, ke la malmultaj reformantoj fine komprenu tiujn saĝajn vortojn kaj ne perdu sian tempon per bablado, kiu havas tiun solan rezulton malfaciligi nian propagandon ĉe la seriozaj kaj praktikaj homoj, kiuj ne lernos lingvon, ankoraŭ nepretan aŭ en ĝermo – eĉ se tiu ĝermo estus mirinda. Kiel bone konkludas artikolo de nia kunfrato **Lingvo Internacia** :

A.- « Unueco – ne perfekteco – estas la sola kondiĉo por la atingo de nia jam komenciĝanta venko ; kaj « plibonigo », kiu rompus eĉ malmulte nian unuecon, estus por ni, pro tiu ĉi simpla fakto, danĝerega kaj prezentus rekte la malon de efektiva plibonigo. »

Cl.- En la junia **Kroniko Esperantista** Hector Hodler rehas frazon kontraŭ la reformismo :

A.- « Iom post iom, la nombro de la personoj, kiuj estas kapablaj korekte kaj rapide paroli Esperante ĉiutage pligrandiĝas, kaj tia fenomeno estas plene kuraĝiga, ĉar ĝi montras, ke nia lingvo pli-kaj-pli eniras la kampon praktikan kaj faktan. Reformi ĝin aŭ enkonduki en ĝin tro multajn neologismojn jam fariĝas neeble en la nuna tempo – tiom pli ke la ĉiam pligrandiĝanta materialo de libroj kaj ĉiaspekaj verkoj estas la plej bona certigo pri la konservado kaj netuŝebleco de la nuna formo de lingvo. »

Cl.- En la julia numero, kiu festis la dudekan jubileon de esperanto, Hector Hodler profitas longe citadi Zamenhof. Li represigas parton de la verko *Aldono de la Dua Libro*, kie Zamenhof klare esprimis sian sintenon rilate al la temo lingvo internacia. Jen por fini tiun ĉi prelegon kelkaj citaĵoj el tiu valorega teksto, kiu multe influis la penson de Hector Hodler :

A.- « Nur viva konkursa laboro, ĉe kia ĉio pli bona iom post iom elpuŝas la malpli bonan, povas doni efektive bonan kaj vivipovantan lingvon internacian. [...]

Cl.- Oni devas memori, ke ĉiu lingvo servas por esprimi niajn pensojn, sed ne por senpense traduki el aliaj lingvoj ; oni devas tial peni esprimadi siajn pensojn per la jam estantaj vortoj kaj kreadi novajn vortojn nur tie, kie ili estas efektive necesaj, - kaj tiam la vortoj nove kreataj estos nur malofte disĵetitaj inter la multo da vortoj jam konataj kaj povos facile aliĝi al la lingvo kaj riĉigi ĝin ne perdigante ĝian unuformecon. [...]

A.- Ju pli energie vastiĝos kaj riĉiĝos la literaturo de la lingvo internacia, des pli baldaŭ ni havos unuforman pli malpli plenan vortaron. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-